

**BAPTO DE LA SINJORO – la 7an de januaro 2018**

## **ĈI TIU ESTAS MIA FILO, KIUN MI AMAS KAJ ŜATAS**

**Komento al Evangelio de Alberto Maggi fratulo OSM**

**El la evangelio laŭ Marko 1, 7-11**

**En tiu tempo Johano predikis, dirante: «Venas post mi tiu, kiu estas pli potenca ol mi, antaŭ kiu mi ne estas inda kliniĝinte malligi la rimenojn de liaj ŝuoj. Mi vin baptis nur per akvo; sed li vin baptos per la Sankta Spirito».**

**Ĝuste en tiuj tagoj ankaŭ Jesuo venis el Nazaret de Galileo, kaj estis baptita de Johano en Jordano. Kiam Jesuo eliris el la akvo, la ĉielo malfermiĝis kaj la Sankta Spirito malsupreniris kiel kolombo sur Lin. Tiam venis voĉo el la ĉielo: «Vi estas mia Filo, kiun Mi amas kaj ŝatas».**

Ĉiuj evangeliistoj konkorde indikas la agadon de Jesuo, kiel tiun de tiu kiu baptas en la Sankta Spirito. Kaj tio eblas ĉar en Jesuo enestas la pleneco de la Sankta Spirito, nome la forto, la kapablo kaj la amopovo de Dio. Tiu akcepto de la Spirito flanke de Jesuo estas indikata de la evangeliistoj en la epizodo de la bapto. Ni legu kiel ĝin rakontas al ni la evangeliisto Marko.

Ĝuste en tiuj tagoj...” – tiu esprimo “en tiuj tagoj”, kiu aperas la unuan fojon en tiu ĉi evangelio, indikas la plenumon de la promesoj de Dio. – “Jesuo” – la nomo samas al Josuo, en la hebrea, iu kiu enirigis la popolon en la promesitan landon – sed poste la akreditiletoj de tiu Jesuo estas vere fiaj, ĉar, skribas al ni la evangeliisto, ke “«venis el Nazaret de Galileo ...»”. Galileo estas malŝatata regiono, la regiono de la perfortuloj, de la revoluciuloj – je la tempo de Jesuo diri “galileano” signifis diri “fanatikulo” – nu Jesuo venas ĝuste el Galileo. Sed oni kredis ke la Mesio devos veni el Judujo, de la sankta regiono, kaj ne el Galileo.

Kaj krome li venas ĝuste de Nazaret, kiu estis sovaĝa vilaĝo, kun malbona reputacio, kiu estis iele la kaŝejo kie rifuĝis la zelotoj, la revoluciuloj,

kontraŭ Romo. Oni ne devas forgesi ke estis ankoraŭ vigla la memoro pri Judas la Galileano, kiu ĝuste venis el Galileo: li sin proklamis Mesio kaj komencis revolucion kontraŭ Romo, finiĝintan poste sangelverŝe.

“«Kaj estis baptita de Johano en Jordano»”. Johano anoncis bapton de konvertiĝo por la pardono de la pekoj. Kial Jesuo iras sin baptigi? La bapto estas simbolo de morto: oni enmergiĝas kaj mortas je propra pasinto.

Ankaŭ por Jesuo la bapto estos simbolo de morto, sed ne je nejusta, pekopena pasinto – kiun li ne havas por perdonigi – sed de akcepto de morto en propra estonto: donaco de sia amo al la homoj, kiu povas eĉ atingi la decidon akcepti la morton. Fakte Jesuo kiam li parolos pri sia morto, parolos pri ĝi kiel pri bapto: “estas iu bapto kiun mi devas akcepti”.

Kaj ni vidu kiel la evangeliisto priskribas tiun bapton de Jesuo, enmetante en la scenon de la bapto la samajn vortojn kiujn li poste utiligos en la momento de la morto, por indiki ke bapto kaj morto de Jesuo estas unu sola afero.

“«Kiam Jesuo eliris el la akvo... »” - eniri en la akvon estas enmergiĝo en la morton, sed la morto ne retenas Jesuon – Jesuo tuj eliras de la akvo. “«... malfermiĝis ...»”- gravas tiu verbo malfermiĝi – “«... la ĉielo...»” : oni kredis ke Dio estis tiom kolera kontraŭ la homaro ke li iele sigelis la ĉielon, ne plu estis komuniko inter Dio kaj lia popolo – sufiĉas pensi al la deziro de Jesaja en lia libro, kiam li skribas “Ha, se vi malfermus la ĉielon kaj malsuprenirus!”

Estis do tiu atendo ke Dio malfermus la ĉielon: sed la ĉielo estis fermita, estis sigelita. Nu, en la momento kiam Jesuo sin devontigas manifesti la senliman amon de Dio, estas respondo flanke de Dio per senlima amo. Kaj la ĉielo ne malfermiĝas: io kio malfermiĝas povas poste fermiĝi. La ĉielo ne simple malfermiĝas, sed “disŝiriĝas”, kaj ili do ne plu povas esti rekunigataj: per Jesuo la komuniko de Dio kun la homaro estos, ekde tiu momento, daŭra, krestanta kaj seninterrompa.

Nu, tiun verbon “disŝiriĝi” ni retrovas poste en la momento de la morto de Jesuo, kiam “la kurteno de la Templo disŝiriĝis” la kurteno kaŝis la sekretan ĉambron kie oni kredis ke ĉeestas Dio: en la momento en kiu Jesuo mortas surkruce, la kurteno disŝiriĝas kaj elmontras kiu estas Dio. Kiu estas Dio? Li estas la homo kiu pro amo donacis sian vivon mem.

“« kaj la Sankta Spirito ...»” – la artikolo indikas la totalecon - «... la Spirito ...»” – kaj Jesuo, la agado de Jesuo estos bapti en la Sankta Spirito,

sed sur Jesuon ne malsupreniras la Sankta Spirito, sed "la Spirito" – ĉar "Sankta" ne indikas nur la kvaliton de tiu Spirito sed la agadon konsekri, disigi la homon de la malbono – kaj Jesuo ne bezonas esti disigita de la malbono.

"« Kaj la Spirito... »" – la totala amo de Dio do – "«... malsupreniris sur lin...»": en la momento en kiu Jesuo supreniras el la akvo, jen iu movo kiu de la ĉielo, malsupreniras la Spirito sur Jesuon.

Tiun vorton - "Spirito" – ni retrovas ankaŭ pli poste dum la morto de Jesuo, kiam Jesuo "elspiris", kiu en la greka havas la saman radikon de "Spirito": Jesuo surkruce, la Spiriton kiun li ricevis en la momento de la bapto, li komunikas al tiuj kiuj ĝin akceptas, kaj kun li kaj kiel li volas dediĉi propran vivon por la bono de la homoj. Tiu Spirito malsupreniras al li "«... kiel kolombo ... »". Kial tiu bildo de kolombo? Estis proverbeca la amo de la kolombo por propra nesto: ankaŭ se oni ŝanĝas la neston de iu kolombo, ĝi ĉiam revenas al sia origina nesto.

Jesuo,do, estas la nesto, estas la hejmo de la Spirito. Krome la bildo kiu estas en la libro de Genezo, ke la Spirito de la Sinjoro ŝvebis – en la momento de la kreado – super la akvoj, estis interpretata de la rabenoj kiel la flugo de iu kolombo super sia idaro. Do, tiu aludo al la kreado montras ke en Jesuo realiĝas la plenumo de la plano de Dio pri la homaro, la plano de la kreado.

"«Tiam venis voĉo el la ĉielo...»" - dum Jesuo vidis disŝiriĝi la ĉielon, do temis pri lia sperto – en tiu ĉi kazo la voĉo venis de la ĉielo, temas do pri monro por ĉiuj. Nu, la saman vorton "voĉo" – en la greka "fonè" – ni retrovas en la momento de la morto de Jesuo, kiam – strangas ke Jesuo agonianta, jam mortonta – skribas la evangeliisto – "eligis laŭtan krion": la vortoj "krio" kaj "voĉo" en la greka samas.

Temas pri venkokrio ĉar la amo estas pli forta ol la morto, la amo estas pli forta ol la peko: kiam Petro perfidis Jesuon, la koko kantis kaj la verbo en la greka lingvo samas, estas "la krio". Nu, la amo de Jesuo estas pli forta ol la peko de propra disĉiplo: ĝi estas do la "krio" de venko.

Kaj en tiu kazo la voĉo de la ĉielo – la evangeliisto reportas nin al citaĵo de Psalmo 2, versiklo 7 - "« Vi estas mia Filo»". En tiu kazo ĝi ne tiom indikas kiu estas Jesuo, sed kiu estas Dio: se Jesuo celas dediĉi sian tutan ekziston por komuniki la vivon al la homoj – filo estas tiu kiu similas al sia patro en sia konduto – tio signifas ke tiu estas la agado de Dio.

La agado de Dio estas komuniki vivon al la homoj por ke ili havu ĝin abunde.

“«Vi estas mia Filo»” - kaj ankaŭ tiun esprimon “la Filo de Dio, mia Filo” ni retrovas en la momento de la morto de Jesuo: la nura kiu komprenis Jesuon, ne estis liaj familianoj nek liaj disĉiploj, des malpli la pastroj kaj la fariseoj, sed iu pagano, iu fremdulo, la centestro, la ekzekutisto ĉeestanta la krucumadon.

Skribas la evangeliisto ke “vidante lin morti tiele... ”- tiele amoriĉa-“ la centestro ekriis: “Vere tiu homo estas la Filo de Dio!»”. Ni do vidis ke la vortojn utiligatajn por priskribi la bapton, la evangeliisto reutiligas je la momento de la morto de Jesuo, por indiki ke, por Jesuo, la bapto estas la akcepto de morto en la estonto: por esti fidela al la amo de Dio, por liberigi la homojn, Jesuo iros renkonte al la morto.

Tiu peco konkudiĝas poste per la esprimo “«... la amata ...»”. La amata signifas la heredonta filo, tiu kiu heredos ĉion de la Patro, ne eblas dividi Jesuon de Dio, Dio kaj Jesuo estas la sama afero. En Jesuo, Dio manifestas tion kio li estas: Senfina amo por la tuta homaro.

“«... kaj en vi mi metis mian ŝaton... »” : la ŝato de la Patro estas la komuniko de vivpleneco – la Spirito – kiun poste Jesuo komunikos al tiuj kiuj lin akceptos.